**N I A V O Ĉ O**
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
FEBRUARO 1995

★ ★ ★ VIDU, EN APARTA FOLIO, PROTOKOLON DE LA PASINTA ASEMBLEO ★ ★ ★

## VIZITO AL PROPAD

Margarita kaj edzo vizitis al nia karaj familio Casquero-Ballester en Slovakio. Ili donis videon filmitan de Juan Carlos dum Zamenhofa festo kaj transdonis al niaj geamikoj kaj "amiketoj" amason da kisoj de madridaj esperantistoj. Ili rakontas kaj ne finas pri la bela montara regiono kaj rekomendas al ski-amantoj vojaĝi al tiu-ĉi esperanta urbo.

## MICHAEL JACKSON KAJ ESPERANTO

La fama rokmuzika idolo uzas esperanton en tri-kaj duon-minuta videofilmo kiu reklamas lian baldaŭan elirontan diskon "History". Kian rolon ludas nia lingvo en la filmo, ne estas certe, ĉar -kiel kutime- ĉio ĉirkaŭ Jackson envolvas reklamcelan misteron. La filmeto, farita en Budapeŝto en 10 tagoj, prezentas lin kiel liberiganton de orient-eŭropa popolo. Sur la sola foto el la filmo kiun lia agentejo disponigis al gazetoj, videblas soldatoj kies brakbendon ornamas stelo -eventuale verda-. La esperantan tekston tradukis usona UEA-fakdelegito, kiu estis dungita por Jackson, li konfirmas ke "Esperanto estas multe uzata en la filmo. Infanoj kantas esperante: Mi amas vin Michael Jackson" "Esperanto. 1/95"

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde/ĵaŭde, ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

En Centro Cultural "Maestro Alonso" (Ventas) merkrede je la 18,30 h okazas baza kurso de esperanto.

Prelegoj dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

- 13-an de februaro. "La poeto Adriano del Valle kiel tuta artisto". L.Ojer
- 20-an februaro. "Malsupreniĝi maŭren". C. Suárez
- 13-an marto. "La Zamnehofa reformo pri supersignoj". J. Navareño
- 17-an aprilo. "La tempo kaj la spaco eble mezuritaj en decimala sistemo". L.Ojer
- 8-an majo "Propad: Esperanta urbo". (video) J.C. Ruiz

## NOVAJ METODOJ

En Argentinio, Georgo Abraham, aŭtoro de neeldonita vortaro araba-E-araba, finverkis du lernolibrojn laŭ tradicia gramatika metodo: "El Esperanto explicado" por hispanlingvanoj, kaj "Kurso de Esperanto, la internacia lingvo" por arab-parolantoj. ("Esperanto", Januaro 1995)

## ESPERANTE

En Hispanio eksistas 57 stratoj, unu monumento, 4 placoj, hoteloj, parkoj aŭ restauracioj, 6 memortabuloj kaj 3 kultur-centroj, muzeoj aŭ firmoj kun la nomo esperanto aŭ Zamenhof, laŭ datumoj de Hugo Rollinger (HdE n-ro 1899).

## HISPANA ESPERANTO-VORTARO

MEL trovis, en Madrido, eldoniston interesatan en "paroli" pri eldono de la vortaro verkita de F. de Diego. Li estas faka en la eldono kaj distribuado de vortaroj kaj lernolibroj. MEL informis pri tio al HEF-CO por programi intervjuon inter eldonisto kaj respondeculo en Hispanio pri tiu afero.

## "Nia voĉo" DISTRIBUADO

Pro la altigo de la poŝtmark-prezo:15 PTA por Madrido kaj 19 por provincoj ni nur sendos al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1994 kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontraŭ 68 poŝtmarkoj po 15 PTA (1.020 PTA).
(PTA <> pesetoj kiel $ <> dolaroj, laŭ ISO Internacia Standara Organizo)

## ARĜENTA INSIGNO KUN VERDA STELO

Farita de juvelisto simpatianto de Esperanto, MEL oferas po 300 PTA esperantan insignon faritan el arĝento kun emajloj blanka kaj verda. Sendoj po dek (10) antaŭpago de 2.700 PTA pere de poŝmandato al Madrida Esperanto-Liceo (inkludas sendokoston).

**HISPANIO**
Tomás Ortiz informas ke, kun la Urbodomo de San Javier (Murcio) kiel patrono, okazas la 1-an kurso de esperanto. Antauen Tomás!
Jorge Camacho, translokiĝis al Bruselo por labori kiel interpretisto/tradukisto de la fina lingvo en la Europa Komunumo. Felican restadon!

***HEF ANGULO*** *(Ne oficiale)*
*Pedro A. Garrote, vic-prezidanto de la Liceo, enkomputiligis la 1994-kontojn de HEF laŭ la programo "ad-hoc" de Fundación Caja Madrid. La "cuenta de explotación" (en-elspezoj) estas preta por eldoni en venonta "Boletin", tiel oni povas ricevi komentariojn antaŭ la Ĝenerala Asembleo de HEF.*
*Manolo Parra helpas al Marcos Cruz en oficejaj laboroj de HEF, li estas marde vespere en CO.*

**FOR LA GETO!**
Jam kelkfoje ni parolis pri la instruado de esperanto for de niaj grupoj (sidejoj). Ankaŭ niaj libroj devas esti venditaj en publikaj librovendejoj ekster niaj esperantaj libroservoj (precipe lernolibroj, vortaroj kaj hispanlingvaj inform-libroj). MEL vendis librojn (ne multaj) tia maniero kaj kurioze petis vendejoj ekster Madrido eksemplerojn de "Historia del esperanto en Madrid", eble ĝi estas ene de katalogo per koresponda vendado. La sistemo por vendi ĉe librovendejoj estas jena:

1.- Lasu, kiel depono, unu aŭ du eksemplerojn de ĉiuj disponeblaj libroj. Vi devas alporti paperon kun vendo-kosto, kaj rabato, kiu la librovendisto devas subskribi aŭ stampi.

2.- Post 8/10 monatoj telefonu/iru demandante pri la vendado.

3.- Se ĝi vendis faru fakturon (IVA, NIF, rabato). Eble la librovendisto akceptos pliajn kiel deponon. Se ĝi NE vendis ion prenu la stokon kaj serĉu alian librovendejon.

**GUINNESS REKORDOJ**
En siaj novaj eldonoj (1995,p.85), la fama Libro de Rekordoj Guinness denove aperigis artikoleton pri esperanto, lingvo sen malregulaj verboj.

**BESEDOJ-KAFEJAJ DISKUTRONDOJ**
Preskaŭ monate, membroj de la "ibera skolo" (Camacho, Miguel Fernández, Adúriz, A. Valén, ktp) kunvenas en kafejo de la antikva Madrido. Ili voĵaĝas ĝis la ĉefurbo por ĉeesti literaturan besedon kaj prepari kolektivajn verkojn

**ĜENERALA ASEMBLEO DE MEL**
En aparta folio ni eldonas protokolon de la ĝenerala asembleo okazinta la 30-an de januaro. Esperanto-Liceo de Madrid havas novan prezidanto: Juan Carlos Ruiz Sierra, li dum multaj jaroj estis membro de la estraro sed neniam prezidis MEL. Lia labor-kapablo estas de ĉiuj konata pro tio ni esperas sukcesan etapon por la Liceo. Por alia estrarano vidu protokolon.
Pro manko de alia volontulo "Nia Voco" daurigos *erare* farita de Lupe.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# P R E S U P U E S T O 1.9 9 5

Esperanto Liceo de Madrid
Atocha 98. 28012 Madrid

GASTOS

| concepto | pesetas |
|---|---|
| Material Biblioteca/oficina | 25.000 |
| Edición directorio grupos | 15.000 |
| Edición folleto "supersignos" | 15.000 |
| Edición Boletín "Nia Voĉo" | 20.000 |
| Suscripción a revistas | 20.000 |
| Cuotas asociaciones | 15.000 |
| Compra libros | 40.000 |
| Correo/paquetería | 20.000 |
| Mantenimiento local | 30.000 |
| Alquiler local social | 360.000 |
| Luz | 20.000 |
| Teléfono | 35.000 |
| Comisiones bancarias | 5.000 |
| TOTAL GASTOS | 620.000 pesetas |

INGRESOS

| | |
|---|---|
| Cuota socios | 170.000 |
| Donativos/colaboraciones | 220.000 |
| Lotería Navidad 95 | 130.000 |
| Ingresos financieros | 90.000 |
| Venta de libros y otros | 10.000 |
| TOTAL INGRESOS | 620.000 pesetas |

El tesorero

Madrid 31 de diciembre de 1994